

84a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO 2026



PORTUGALETE


de la 14a ĝis la 18a de Julio

Petri

UNED

BIZKAIA

120 jaroj



ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)

INDEKSO

- Loka kongresa komitato (LKK)	2
- La prezidanto de la LKK salutas vin	3
- Hispanaj kongresoj de Esperanto	5
- Esperanto en Bizkajo	7
- Kongresa programo	10
- Prelegantoj	14
- Mapo	18
- Utilaj informoj	29
- Notoj	36

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)




LOKA KONGRESA KOMITATO (LKK)

Prezidanto	Jesús Miguel García Iturrioz
Sekretariino	Milagros Mezo del Río
Kasistino	Yolanda Díez Saiz de la Maza
Kongreslibro	Enriqueta Sesmero Cutanda
Amaskomunikiloj	Susana Zabaco Perex
Programo	Yolanda Díez Saiz de la Maza Carlos Llama Salazar Jesús Miguel García Iturrioz
Ekskursoj	Yolanda Díez Saiz de la Maza
Retaferoj	Miguel Ángel Sancho Pardo
Kultura Programo	Susana Zabaco Pérez
Oficiala afiŝo, identigiloj, diplomoj...	Patxi de la Hoz Méndez
Kongresejo	Octavio Gutiérrez Moja Alberto Lobato Reguera

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)



LA PREZIDANTO DE LA LKK SALUTAS VIN



Estimataj gekongresanoj:

La pasintan jaron, dum Hispana Kongreso en Soria, membroj de la E-Grupo de Bilbao kuraĝis peti la okazigon de la ĉijara kongreso en Portugalete.

El persona vidpunkto, tio signifis la realigon de antaŭjara revo: mia naskiĝurbo iĝos sidejo de Hispana Kongreso de Esperanto.

Jam tiam samideanoj atentigis min pri la malfacilaĵoj kiuj stariĝus antaŭ ni. Spite de tio, ni sukcesis organizi multthoman LKK, kies membroj entuziasme prenis sur sin la diversajn taskojn. Tamen malfacilaĵoj alvenis. La ĉefa estis, ke ni troviĝas en malgranda urbo, kie la rimedoj ne abundas. Ekzemple, ne ekzistas en ĝi kongresdomo, nek impona kulturdomo, nek multe da loĝejoj, nek, nek... Alie, neniu LKK-ano, krom mi, loĝas en la urbo. Sed problemoj estis solvataj kaj ni jam troviĝas ene de tiu ĉi kongreso.

Organizantoj apartenas al “Grupo Esperantista de Bilbao”, kiu ĉijare preskaŭ jubileas: la 20an de majo ĝi festis la 120an datrevenon de sia kreo. Do, temas pri unu el la plej aĝaj E-rondoj en Hispanujo, kun historio tre ligita al tiu tre komplika de nia lando laŭlonge de la 20a jarcento.

Afero malpli konata estas tio, ke en tiu sama jaro 1906, oni starigis E-asocion en Portugalete kun 86 homoj. Estis kursoj en lernejo, kies Direktoro, Francisco Vallejo, estis samtempe la Prezidanto de la E-rondo. Tiu lernejo kaj tiu E-grupo jam ne ekzistas, sed informas pri frua eniro de la Internacia Lingvo en Portugalete.

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO

Fine, mi ne volas forgesi la fakton, ke jam la kvinan fojon, la E-Grupo de Bilbao organizis kongreson de hispanaj esperantistoj, laste en 2004, kune kun kongreso


de Eŭropa E-Unio (EEU). Do, la ĉijara estos la 6a.



Nome de la tuta LKK, mi deziras al vi ĉiuj agrablan kaj fruktodonan restadon en Portugalete... kaj en najbara urbo Bilbao, kie kelkaj el vi trovis loĝejon.

120

Jesús Miguel García Iturrioz,
Prezidanto de la LKK



ESPERANTA GRUPO DE BILBAO

(1906-2026)




HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1	1920	Barcelona
2	1921	Zaragoza
3	1923	Valencia
4	1924	Bilbao
5	1925	Córdoba
6	1926	Madrid
7	1928	Sevilla
8	1929	Oviedo
9	1932	Madrid
10	1933	Santander
11	1936	Barcelona
12	1951	Tarrasa
13	1952	Valencia
14	1953	Bilbao
15	1954	Zaragoza
16	1955	Gijón
17	1956	Barcelona
18	1957	Madrid
19	1958	Castellón
20	1959	Málaga
21	1960	Pontevedra
22	1961	Palma de M.
23	1962	Valladolid
24	1963	Barcelona
25	1964	Valencia
26	1965	Palencia
27	1966	Bilbao
28	1967	Zaragoza
	1968	UK-Madrid
29	1969	La Laguna
30	1970	Mieres
31	1971	Alicante

32	1972	Vigo
33	1973	Madrid
34	1974	Valladolid
35	1975	Lleida
36	1976	El Ferrol
37	1977	Sabadell
38	1978	León
39	1979	Gijón
40	1980	Madrid
41	1981	Murcia
42	1982	Málaga
43	1983	Zaragoza
44	1984	Sevilla
45	1985	Cartagena
46	1986	Vigo
47	1987	Madrid
48	1988	Valencia
49	1989	Bilbao
50	1990	San Cugat del Valles
51	1991	La Laguna
52	1992	Mérida
	1993	UK-Valencia
53	1994	Málaga
54	1995	Salou
55	1996	Murcia
56	1997	Valencia
57	1998	Valladolid
58	1999	Castellón
59	2000	Alcobendas
60	2001	S. Javier-Murcia
61	2002	Alicante
62	2003	Valencia

63	2004	Bilbao
64	2005	Alcala de Henares
65	2006	Valencia
66	2007	Palos de la F.
67	2008	Cuenca
68	2009	Málaga
69	2010	Santiago de C.
70	2011	El Escorial
71	2012	Almagro
72	2013	Zaragoza
73	2014	Málaga-Ronda
74	2015	Cullera

75	2016	Herrera del Duque
76	2017	Teruel
77	2018	Madrid
78	2019	Málaga
	2020	Comillas (Ne okazis)
79	2021	Comillas (Virtuele)
80	2022	Cantabria (Comillas)
81	2023	Sevilla
82	2024	Valencia (Cheste)
83	2025	Soria
84	2026	Portugalete



(1906-2026)



ESPERANTO EN BIZKAJO

Laŭ rakontis la plej maljunaj esperantistoj, ĉirkaŭ la jaro 1904, loĝis en Algorta (loko 13 km. norde de Bilbao) tiu, kiu ŝajne estis la unua esperantisto en Bizkajo, nome Rufino de Unzaga. Tiun ĉi saman jaron, malgrava evento, tiel kiel publikigo de artikolo pri Esperanto en loka ĵurnalo, estis la “malgranda kandelado de kiu forbrulas granda kastelo”.

Sekve de tio, diversaj grupoj de homoj kortuŝitaj de la “interna ideo”, kunsidis kun la celo lerni Esperanton. Unu el tiuj grupoj formis kelkaj socioj de la ege fama, elita kaj aristokrata “Sociedad Bilbaína” (“Bilbaoana Societo”), kiu ankoraŭ ekzistas; inter la elstaruloj, kiuj tiamaniere alvenis al Esperantujo, indas menciigi Víctor Olegario de Allende, ĉefinĝeniero pri transportvojoj de Bizkajo; Juan Zabala, administranto de la tiel nomata “Patrineca Domo”; José Echevarría, kies frato Federico estis fondinto de grava entrepreno “Echevarría, S.A.”, lokita kie nun troviĝas granda parko de Bilbao, la “Parko Echevarría”; José Velasco, komisiito de komercentrepreno “A. Konrad & Co.”; ktp.

Personoj apartenantaj al pli modestaj socitavoloj, preskaŭ ĉiuj kontoristoj, formis alian grupon, kies sidejo estis la privata loĝejo de Teodosio Mendive. Krome, alia grupo aperis en la “Studenta Asocio”.




Kaj sendepende de tiuj ĉi grupoj, estas speciale menciinda Teodoro Elizondo, aŭtodidakto kiu sen alies helpo plenregis la Internacian Lingvon en tre mallonga tempo. Li estis la aŭtoro de “Tuto”, la unua vortaro Eŭskera-Esperanto, poste titolita “Esperanto giltza”, t.e., “Ŝlosilo de Esperanto”.

Tia estis la situacio ĉirkaŭ 1905-1906, kiam la membroj de tiuj tri grupoj, kune kun Sro. Elizondo kaj aliaj individuaj simpatiantoj, decidis fondi komunan asocion. Por tion efektiviĝi, estis alvoko, pere de lokaj ĵurnaloj. Tiu alvoko plene sukcesis kaj, ekde tiam, ĉiam kun la sama nomo, ekzistas la “Grupo Esperantista de Bilbao”, fondita la 20an de marto 1906. La unuan estraron gvidis Teodoro Elizondo (Prezidanto), Víctor O. de Allende (Vicprezidanto)

kaj Rufino de Unzaga (Sekretario).

Tamen, la unua E-grupo en Bizkajo ne estis tiu de Bilbao, sed alia fondita en 1905 en Sestao, urbo najbara al Portugalete, kiu ne lasis postajn spurojn, sed kies naskiĝo estis referencata de la “Hispana Societo por la propagando de Esperanto”, antaŭanto de la nuna Hispana E-Federacio (HEF), en ĝia “Jarlibro” de la jaro 1906.

Kaj kelkajn monatojn post la fondiĝo de la E-Grupo de Bilbao, en la sama jaro 1906, aperas E-Grupo en la urbo, kie nestas tiu ĉi kongreso, Portugalete, kun 86 membroj. Referencoj pri ĝi aperas en la sama “Jarlibro”, sed de 1907, de “Hispana Societo por la propagando de Esperanto” kaj en la revuo “La Suno Hispana” (Jan. 1907). Vicprezidanto estis la instruisto Ruperto Medina (dekstra foto), kies nomon nun portas bazlernejo kaj strato de Portugalete.




Membro de tiu grupo de Portugalete estis ankaŭ homo alte estimata en la urbo. Li estis kuracisto, kiu senpage flegis malriĉajn homojn: Juan José Conde Pelayo, kies nomon nun portas placo. Intelektulo kaj ateisto, en antaŭa urba tombejo lia impona tombo, starigita danke al sindonemo de la civitanaro de Portugalete, elstaris en aparta angulo, for de la muroj de katolika tombejo, forgesita de aŭtoritatuloj dum diktatura epoko. Feliĉe, post alveno de demokratio, malaperis tiu apartigo de nekatolikuloj.

Alia loko, kie floris Esperanto, estis malgranda minista vilaĝo kiun ni vizitos dum kongresa ekskurso: La Arboleda. Tie, danke al laboro de kuracisto Jorge Hita, multaj ministoj lernis Esperanton en tre malfavoraj kondiĉoj (“ĉar tiuj ministoj estis devigataj labori ĉiutage kaj ege lacige ekde la sesa vespere ĝis la sesa frumatene”). Tie ekzistis E-societo, eĉ la 8an de junio de 1913 oni inaŭguris, ene de granda festado, straton “Dr. Zamenhof”.



Ĉi tie finiĝas eta enkonduko al pioniraj jaroj de Esperanto en nia provinco Bizkajo, kaj por fini ni memoru la hispanajn kongresojn okazintajn en ĝi, ĉiuj en la ĉefurbo Bilbao.



La unua, en 1924: “2a Kongreso de Iberiaj Esperantistoj”. Poste, en 1953, la 3a kongreso post malleĝigo de E-movado en Hispanio, dum diktatura epoko, post la hispana interna milito (1936/39). Poste, en 1966. Sekvis alia en 1989. Kaj la lasta ĝis nun, en 2004, kiu ankaŭ estis kongreso de Eŭropa E-Unio (EEU).

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)



KONGRESA PROGRAMO

Mardo 14/07

10:00	Akceptado de kongresanoj.
11:00-12:00	Prelego pri Portugalete kaj informoj diversaj (Jesús M. García).
12:00-13:00	Bilbaoaj kantoj (Rafa Blanco).
12:00-13:00	Bilanco de 8 jaroj de E-kursoj en UNED (Félix Jiménez).
15:30-17:30	Marŝado tra Portugalete. Eliro el kongresejo
18:00-20:00	Interkona vespero. Lunĉo (Municipa sportejo “Pando Aisia”)

Merkredo 15/07

10:00	Akceptado de kongresanoj. Libroservo.
10:00-11:00	Prestiĝo de Esperanto (Alexander Zdechlik). Pri tradukado (Joxemari Sarasua).
11:00-12:00	Du esperantistoj inter la unuaj eŭskaj ministroj (Toño del Barrio).
12:00-13:00	Malfermo de la kongreso.
13:00-13:15	Komuna foto ĉe la ĝardeno antaŭ la kongresejo.

15:30-18:00	Marŝado ĝis urbo Sestao laŭ la riverbordo – Alta forno.
20:00-21:00	Muzika vespero ĉe la preĝejo de Sankta Maria
Ĵaŭdo 16/07	
09:30-11:00	Magio (T. Badía-M. Burritxaga). Konversacia rondo 1 (Dalia Pileckiene).
10:00-12:00	Libroservo.
11:00-12:00	Artefarita Intelektio (Patxi de la Hoz). Mallonga kurso pri eŭska lingvo 1 (Rafa Blanco).
12:00-13:00	Komiksoj en Esperanto (Eduardo Berdor). Miguel de Unamuno kaj origamio (Susana Zabaco)
15:30-18:00	Marŝado tra apudmara urbo Getxo (pr. Geĉo). aŭ La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo (per publikaj transportoj [buso+kablitramo]).
19:00	Vizito piede al apuda urbo Santurtzi (Santurce), kie oni celebras la feston de “Virgulino de Karmen” (“Nia sinjorino de la Monto Karmelo”), protektantino de maristoj.

Vendredo 17/07

10:00-11:00

Ĝenerala HEF-kunveno.

10:00-11:30

Konversacia rondo 2 (Dalia Pileckiene).

11:00-12:00

Blisa Skribo-Lingvo sen voĉo (Boguslaw Ubik-Perski).

Kunveno de la HEF-estraro kun hispanaj E-grupoj.

12:00-13:00

Kongresa fermo.

13:00-13:15

Rea komuna foto ĉe la ĝardeno antaŭ la kongresejo.

15:00-19:00

Perŝipe el Portugaleta ĝis Bilbao laŭ la rivero (**Maksimuma nombro da partoprenantoj: 80**). Suprenirado per kablotramo al monto Artxanda (251 m.) [Panoramo de Bilbao]. Vizito al malnova kvartalo de Bilbao. Vizito al E-Grupejo (lunĉo).

Sabato 18/07

09:00

Renkontiĝo ĉe la kongresejo (Enaŭtobusiĝo). (**Maksimuma nombro da partoprenantoj: 58**).

09:20-10:00

Vizito al La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo.

10:30-12:00

Forĝejo El Pobal.



12:20

Gallarta (naskiĝloko de Dolores Ibárruri [“Pasionaria”]).

12:30-14:00

Muzeo pri mineroj.

14:30

Komuna bankedo (“Batzoki” de Santurtzi-10 min. piede de la kongresejo (**Maksimuma nombro da partoprenantoj: 65**)).

120

120

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)



PRELEGANTOJ

Rafa Blanco Arbe [Bilbaoaj kantoj-Kurso eŭska lingvo]

(Mardo 14/07 – 12:00–13:00 [Bilbaoaj kantoj])

(Ĵaŭdo 16/07 – 11:00-12:00 [Kurso eŭska lingvo 1])

(Vendredo 17/07 – 11:00-12:00 [Kurso eŭska lingvo 2])




“La bilbaoaj kantoj”

En la hispana lingvo estas konata la vorto “bilbainada” por (ne nur) priskribi kelkajn popolajn kantojn, kiujn bilbaoanoj gaje kunkantis laŭlonge de la dudeka jarcento. Temas pri valsoj, marŝoj, habaneroj kaj alispecaj muzikaj formoj kiuj iĝis ege popularaj ne nur en Bilbao, sed ĉefe en tiu urbeĝo. En tiu kongresa ateliero ni provos kaj kunkantos fasketon da ili.

“La eŭska lingvo”

Dum tiu dusesia ateliero, ĉeestantoj konos plej bazajn aferojn pri tiu lingvo, nome, iomete da historio, fonetiko, salutvortoj, verkistoj, baza sintakzo kaj kelkaj vortoj.



Félix Manuel Jiménez Lobo [Bilanco E-kursoj en UNED]

(Mardo 14/07 – 12:00-13:00)



Félix M. Jiménez naskiĝis en Madrido en 1969 kaj lernis Esperanton en 1997. Li studis Biologion, Kulturen Antropologion kaj Interlingvistikon kaj Esperantologion, ĉi lastan en la Universitato Adam Mickiewicz de Poznań, Pollando. Li eklaboris kiel naturmedia teknikisto kaj en la jaro 1998 komenciĝis lia intereso pri la “tria sektoro”, unue kiel voluntulo en asocio por disvolviĝa kunlaboro en Afriko (Ekvatora Gvineo) kaj poste kiel profesia administranto en iu

labor-kooperativo en kiu nuntempe li estas laborpartnero. Inter 2008 kaj 2016 estis Sekretario de Hispana Esperanto Federacio kaj de 2020 li estas prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo. Li prelegis pri sociala kaj solidara ekonomio en diversaj Esperanto-kongresoj. Ekde la jaro 2018 li estas instruisto pri Esperanto en la neĉeesta universitato UNED kaj ekde la 2022 li ankaŭ estas la kunordiganto de la lingvo.

“Ok jaroj de kursoj de Esperanto en UNED: Bilanco”

En 2018 la Universitato pri ne-ĉeesta edukado (UNED) akceptis instrui Esperanton ene de sia fako pri lingvo-instruado (UNED-Idiomas) kunlaborante kun HEF, kiu zorgas pri la enhavo de la kursoj. Ok jaroj poste eblas fari bilancon kaj pensi pri la daŭrigado de la kursoj, kiu dependas nur de la volo de UNED.

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO

(1906-2026)

Aleksander Zdechlik [Prestigo de Esperanto]

(Merkredo 15/07 – 10:00-11:00)



Naskiĝis la 11-an de februaro 1949 en urbo Zabrze (Zabĵe), Pollando. Kun Esperanto li rekontiĝis sufiĉe frue havante 12 jarojn. Sed edukado komence en baza lernejo, poste en mezlernejo kaj fine en altlernejo ne donis al li eblecon okupiĝi serioze pri Esperanto.

Li estiĝis elektoinĝeniero fininte Silezian Politeknikon kaj ĝian Elektran Fakultaton.

Serioze kun Esperanto li komencis okupiĝi kiel 40 jara viro. Tiam lia esperantokono progresiĝis kaj ekde 1997 li estis elektita kiel estrarano de Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio. Li tie laboris multjare kompreneble senpage. Post sia emeritiĝo en la jaro 2014 li laboris volontule duonjare en Bona Espero-Brazilo.

En la jaro 2016 li estis elektita kiel prezidanto de PEA. Post 3 jaroj li rezignis plu labori en la Ĉefa Estraro de PEA kaj ekde tiam li estiĝis simpla ano de la organizo. Liaj ŝatokupoj estas ŝakludo kaj vojaĝoj.

“Debato pri prestigio de Esperanto”

Prelego-diskuto farita de Aleksander Zdechlik havas celon pridiskuti nunan prestiĝon de Esperanto kaj eblecon kaj devon altigi ĝian nivelon.

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO

(1906-2026)



Toño del Barrio [Du esperantistoj inter la unuaj eŭskaj ministroj]

(Merkredo 15/07 – 11:00-12:00)



José Antonio (Toño) del Barrio naskiĝis en norda Kastilio en 1961, nun li loĝas en la madrida regiono. Esperantisto de 1980. Profesie fizikisto. Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio de 2011 ĝis 2020.

Nun direktoro de Fondaĵo Esperanto. Komitatano de UEA kiel reprezentanto de la individuaj membroj. Li esploris pri historio de Esperanto-movado en Hispanio kaj kontribuis al libroj, gazetoj, blogoj kaj aliaj medioj, per tradukoj, artikoloj kaj originalaj eseoj.

“Du esperantistoj inter la unuaj eŭskaj ministroj”

Dum la hispana interna milito ekfunkciis unuafoje en la historio aŭtonoma registaro en la t.n. Eŭska Komunumo. Ĝi estis plurala kaj konsistis el reprezentantoj de la ĉefaj respublikanaj partioj, sub la gvido de la eŭskaj naciistoj. Inter ties membroj (konsilistoj), du estis aktivaj esperantistoj, Juan Gracia kaj Santiago Aznar, ambaŭ socialistoj. Ni parolos ne nur pri ambaŭ figuroj, sed ankaŭ rakontos pri la estiĝo de la laborista movado en Biskajo, la rolo de la socialismo, la aparta karaktero kiun tiu movado kreis en la areo en kiu disvolviĝos nia kongreso (la maldekstra riverbordo kaj la minista teritorio), kaj la rolo de Esperanto en ĝi.



Juan Gracia Colás


ANTA GRUPO DE
Santiago Aznar Sarachaga
(1906-2026)





1- UNED
Parque Ignacio Ellacuría, 3

2- BAT
Avenida



Seinale konbentzionalak **Signos Convencionales**
Conventional Signs **Signes conventionnels**

- Turismo-bulegoa / Oficina de Turismo
Tourist Office / Office de tourisme
- Aparkaleku / Aparcamiento
Parking / Parking
- Osasun-zentroa / Centro Sanitario
Health Centre / Centre de soins
- Eliza / Iglesia
Church / Eglise
- Gasolindegia / Gasolinera
Petrol Station / Station-service
- Farmazia / Farmacia
Chemist / Pharmacie
- Metroa / Metro
Metro / Métro
- Renfeko Geltokia / Parada Renfe
Renfe Stop / Arrêt Renfe

- Taxi / Taxi
Taxi / Taxi
- Museoa / Museo
Museum / Musée
- Udaltzaingoa / Policia Local
Local Police / Police municipale
- Autobusa / Autobús
Bus / Autobus
- Done Jakue bidea / Camino de Santiago
Way of St. James / Chemin de Saint-Jacques
- Wifi Guneak / Zonas Wifi
Wi-Fi zones / Zones Wi-Fi
- Ostatura / Hospedaje
Lodging / Hébergement
- Postetxean / Oficina Postal
Post Office / Bureau de Poste

5- EMBARCADERO
Paseo La Canilla



6- ALTO HORNO DE
Txabarri (Labe Garaia)



3- PARADA AUTOBÚS
Avenida Ávaro 11 (San Juan de Dios)

4- METRO PEÑOTA
Almirante Díaz de la Pimenta



Líneas: A2315, A3115, A3135, A3136, A3321, A3323, A3332, A3333, A3335

Línea: 2 (Basauri-Kabiezés)



7- BASÍLICA SANTA MARIA
Cantón de la iglesia, 6

8- POLIDEPORTIVO PANDO
Miguel de Unamuno 43

9- METRO PORTUGALETE
Plaza San Roque



Línea: 2 (Basauri-Kabiezés)

Toni Badia kaj Martin Burutxaga [Magio]


(Ĵaŭdo 16/07 – 09:30-11:00)



Peĉjo kaj Tonĉjo, inĝenieroj pri deliraj teknologioj, prezentos sian novan spektaklon: “Ne estas magio, estas scienco”.

Lernu fari tre simplajn iluziojn (“magiaj trukoĵ”) per simplaj kaj facile troveblaj materialoj.

Malkovru iom pli pri iliaj lastaj inventaĵoj naskiĝintaj tie ie en ilia magia sekreta laboratorio.



ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)

Dalia Pileckienė, Litovio (Kaunas) [Konversacia rondo]

(Ĵaŭdo 16/07 – 09:30-11:00)

(Vendredo 17/07 – 10:00-11:30)



Magistrino de socialaj sciencoj kaj administrado.
Diplomita kiel Ĉe-instruisto en 2004.

Ŝi gvidis progresigajn E-kursojn en M.E.S. (en 2017, Les Issambres), en Italio (dum landaj E-kongresoj: en 2018 en San-Marino, en 2019 en Trieste), multfoje en Slovakio (dum SES). Kelkfoje ŝi gvidis “aktivigajn seminariojn” en programo de KLERIGA LUNDO dum UK’oj.

La lasta gvidata E-kurso estis en Greziljono (en 2026, dum “Aŭtunas”).

Dum “konversacia rondo” mi celas paroligi homojn, kreante viglajn (samtempe – pensigajn) situaciojn. Mi estas certa, ke ĉion-ajn oni povas lerni amuze, ŝercante kaj samtempe pliriĉigante sian vortprovizon kaj estimante akuzativon.



ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)



Patxi de la Hoz Méndez [Artefarita Intelektio]

(Ĵaŭdo 16/07 – 11:00-12:00)



Naskita en Bilbao en 1979 kaj esperantisto ekde 1998, li havas bakalaŭran diplomon kaj doktoran gradon pri matematiko de la Universitato de Eŭskio (EHU) kaj diplomon pri komputila inĝenierio de la Nacia Universitato de Distanca Edukado (UNED).

Li estas profesoro kaj esploristo pri pura kaj aplikata matematiko ĉe la Universitato de Eŭskio (EHU) dum pli ol 20 jaroj kaj ĵus fariĝis plena profesoro pri aplikata matematiko ĉe tiu universitato.

Liaj ŝatokupoj inkluzivas la lernadon de lingvoj (li parolas flue pli ol dek lingvojn), la kreadon, korektadon kaj kompostadon de vortaroj, kaj la kuradon de duonmaratonoj.


“Artefarita Intelektio”

Ĉi tiu prelego enkondukas artefaritan intelekton al publiko sen antaŭa scio pri la temo. Ĝi komenciĝas distingante naturan kaj artefaritan intelekton, klarigas kiel maŝina lernado kaj neŭralaj retoj funkcias per simplaj analogioj, kaj montras la mallongan historion de AI, ekde Turing ĝis ChatGPT. Poste ĝi distingas mallarĝan AI (kio ekzistas hodiaŭ) de ĝenerala AI (ankoraŭ teoria), trarigardas kie AI jam aperas en ĉiutaga vivo, kaj klarigas kiel grandaj lingvaj modeloj kiel ChatGPT efektive funkcias. La dua duono pritraktas la avantaĝojn (medicino, klimato, edukado) kaj riskojn (laborperdo, biaso, privateco, misinformado) honeste kaj ekvilibre, poste prezentas etikajn principojn kaj tutmondan reguligon, kaj finiĝas per praktikaj konsiloj por saĝa AI-uzado kaj resumo de la ŝlosilaj temoj.

(1906-2026)

Eduardo Berdor [Komiksoj en Esperanto]

(Ĵaŭdo 16/07 – 12:00-13:00)




Eduardo Berdor naskiĝis en 1981. Li estas instruisto de la franca lingvo en Zaragozo. Li studis Tradukadon en la urbo Soria. Li instruas nun en Zaragozo en oficiala lingva lernejo.

Li estis voĉdonanto en HEF kaj vicprezidanto de la Esperanto klubo en Zaragozo nome “Fratego”. Li estis prezidanto de la organiza kongresa komitato de la 72a Hispana Kongreso de Esperanto.

Dum la lastaj jaroj li instruis Esperanton enrete en la universitato UNED. Li interesiĝas pri lingvoj, muziko, literaturo kaj kinarto.

Mi enkondukos **“bldliteraturon”** kiel ĝenron kiu kombinas bildojn kaj tekston por rakonti aŭ komuniki enhavon. Mi klarigos diversajn specifajn terminojn kaj difinojn uzatajn en la kampo, inkluzive de bildlibroj, bildstrioj, kaj aliaj formoj, kaj poste stiloj kaj temoj estos prezentataj. Mi fine pli specife parolos pri bldliteraturo en Esperanto, multe tradukita sed ankaŭ originala. Mi kunportos kaj priskribos plej multajn ekzemplajn ekzemplerojn kiel eble.



Susana Zabaco [Miguel de Unamuno kaj origamio]


(Ĵaŭdo 16/07 - 12:00-13:00)



Naskiĝis en Bilbao, ŝi komencis siajn muzikajn studojn kun Begoña Sasía, akirante altnivelajn diplomojn pri Piano, Solfeĝo-Teorio-Akompano, Muzika Pedagogio kaj Ĉambra Muziko ĉe la Konservatorio “Juan Crisóstomo de Arriaga” en Bilbao, kaj altnivelan diplomon pri kanto kun María Ángeles Rodríguez, specialiĝante pri Liedo kaj Oratorio. Ekde 2005, ŝi estas profesorino pri kanto kaj Ĉambra Muziko ĉe la Konservatorio “Juan Crisóstomo de Arriaga” en Bilbao.

“Miguel de Unamuno kaj origamio”

Ekde sia infanaĝo, Miguel de Unamuno faldadis paperajn figurojn. Tiu ŝatokupo akompanis lin dum lia tuta vivo. Ĉi tiu prelego proponas vojaĝon tra la biografio kaj verkaro de la pensulo, paralele kun lia flanko kiel origamiisto. Por fini la sesion, ni faldos paperan birdeton, la “cocotta vulgaris unamuniensis”.



ETA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)

Boguslaw UbiK-Perski [Blisa Skribo - lingvo sen voĉo]

(Vendredo 17/07 – 11:00-12:00)




Boguslaw UBIK-PERSKI estas germana civitano kun polaj radikoj. Li naskiĝis en Oświęcim (Aŭŝvico/Auschwitz), Pollando, kaj eklernis Esperanton en adoleska aĝo. Post magistriĝo en Pollando li transloĝiĝis al Germanio. Li loĝas en Weil am Rhein kaj laboris en muzeo pri dezajno ĝis sia emeritiĝo.

Li estas patro de du denaskaj esperantistinoj. Krom Esperanto liaj ĉefaj interesoj estas kulturoj, lingvoj, Blisa Skribo kaj etika veganismo. Lastatempe li aparte okupiĝas pri la rolo de AI en la evoluo de Esperanto.

“Blisa Skribo” estas kvazaŭ la pli juna frato de Esperanto. La vojo de ties kreinto en kelkaj esencaj aspektoj rememorigas tiun de Zamenhof. La historio mem estas, laŭ mia opinio, tre alloga por esperantistoj.

La lingvo estas pure skriba — simbola sistemo, kies signifo estas komprenebla por ĉiuj homoj en ilia propra lingvo. Nuntempe Blisa Skribo (aŭ Blissimboloj) estas ĉefe uzata kiel helpilo por subtena kaj alternativa komunikado, ekzemple de personoj kun cerba paralizo aŭ aliaj severaj parolaj handikapo.



ESPERANTA GRUPO DE BILBAO

(1906-2026)




EKSKURSOJ KAJ ADIAŬA KOMUNA MANĜO

Merkredo 15/07

15:30-18:00




Marŝado apud la rivero ĝis apuda urbo Sestao. Vizito de alta forno. (Senpaga ekskurso).



Alternative, suprenirado piedo al monto Serantes (452 m). Bela panoramo. (Senpaga ekskurso).

Ĵaŭdo 16/07

15:30-18:00



Marŝado tra apuda urbo Getxo (pr. Geĉo), la plej riĉa urbo de Eŭskio. Oni devas transiri la riveron, do kunportu transportkarton "Barik". (Prezo: inter 1,00 kaj 1,50 €).



Alternative, vizito al La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo. Per publikaj transportoj (buso+kablotramo). Kunportu transportkarton "Barik". (Prezo: inter 3,00 kaj 4,00 €).



Vendredo 17/07

15:00-19:00



Perŝipe al Bilbao laŭ la rivero. Alveno en Bilbaon: 16:00 h. **[Maksimuma nombro da partoprenantoj: 80]**. (Prezo: 10,00 €).



Suprenirado per kablotramo al monto Artxanda (251 m). Panoramo de Bilbao. Kunportu transportkarton "Barik". (Prezo: ĉ. 2,00 €).



Vizito piede al malnova kvartalo de Bilbao. Vizito al la E-Klubejo. (Lunĉo).

Sabato 18/07

09:00-14:30

09:00 Eliro per buso.


09:20-10:00 Vizito al La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo.

10:30-12:00 Vizito Forĝejo El Pobal.

12:20 Gallarta (naskiĝloko de Dolores Ibárruri: "Pasionaria").

12:30-14:00 Vizito Muzeo pri mineroj.

[**Maksimuma nombro da partoprenantoj: 58**]. (Prezo: 20,00 €. [inkluzivas buson, forĝejon kaj Muzeon].



14:30



Post la ekskurso, komuna adiaŭa manĝo en la “Batzoki” de Santurtzi.

[**Maksimuma nombro da partoprenantoj: 65**] (Prezo: inter 30,00 kaj 35,00 €).

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)



UTILAJ INFORMOJ

KONGRESEJO

Sidejo de UNED-Bizkaia. Parque Ignacio Ellacuría, 3.
48920 Portugalete (Bizkaia).

URBO

Portugalete, urbeto kun 45.000 loĝantoj.
12 km. norde de Bilbao, kiu estas la ĉefurbo de la provinco Bizkajo.

HOTELOJ

Ne multas en Portugalete. Pro tio, ni rekomendas fruan rezervon. Tamen, Bilbao troviĝas je nur 20 min. de Portugalete per metroo kaj tie estas sufiĉe da restadejoj.

Ankaŭ en la urbetoj, kiuj troviĝas sur la vojo de Bilbao al Portugalete. Tiuj urbetoj estas: Barakaldo (100.000 loĝantoj), Sestao (30.000 loĝantoj) kaj Santurtzi (50.000 loĝantoj).

La hoteloj plej proksimaj al kongresejo estas:

- Hotel Puente Colgante (Portugalete). 10-15 min. piede.
- Hotel Palacio Oriol (Santurtzi). 5 min. piede.
- Hotel San Jorge (Santurtzi). 20 min. piede.

VETURADO ENE DE LA PROVINCO BIZKAJO

Ni rekomendas aĉeti karton nomatan “Barik”, kiu kostas 3€. Post aĉeto, oni devas enmeti monon en ĝi, ĉu per bankokarto, ĉu per kontanta mono, en la maŝinoj, kiuj troviĝas en ĉiuj metrostacioj aŭ en diversaj surstrataj kioskoj.

Unu sama karto povas esti uzata de pluraj homoj kaj validas por la diversaj veturiloj: metroo, busoj, trajnoj de nacia kompanio RENFE, tramo de Bilbao, kablodromo, pendoponto de Portugalete...

ALVENO AL KONGRESEJO

Per aviadilo: Se vi ne deziras kapti taksion, iru al buso kiu troviĝas ĉe la elirejo de la flughaveno, en ĝia plej dekstra flanko. Antaŭ ol eniri buson, vi povas aĉeti la karton “Barik” (3,00€) kaj plenigi ĝin per bankokarto aŭ per kontanta mono; ankaŭ eblas pagi al ŝoforo per kontanta mono, sed estos pli multekoste. La buso, post 20 min., alvenas al la centro de Bilbao kaj finiĝas ĉe la centra busstacio, nomata “Termibús”. Se bezone, tie mem troviĝas metrostacio kaj pluraj busoj al diversaj lokoj.

Per metro: Estas du ĉefaj metroo-linioj. Tiu, kiu iras al Portugalete, estas linio 2. La trajnoj portas la nomon de la lasta stacio; eniru trajnon al “Kabezes”. Atentu, ĉar la linioj 1 kaj 2 kunhavas samajn staciojn ene de la urbo Bilbao. Por iri al kongresejo, eblas eliri en du stacioj: unu estas “Portugalete”, elirejo “Carlos VII”. 10-15 min. piede al kongresejo; la alia estas “Peñota”, elirejo “Hospital San Juan de Dios”. 5-10 min. piede al kongresejo.

Per trajno: De la centra stacidomo de Bilbao, nomata “Abando”, eliras trajnoj de la nacia kompanio RENFE al “Santurtzi”. Laŭ la sama trako iras ankaŭ trajnoj al “Muskiz”. Ne eniru ilin! Survoje al Santurtzi, unu haltejo estas “Peñota” (5-10 min. piede ĝis la kongresejo). Ne eliru en stacio “Portugalete” ĉar estas iom malproksime de la kongresejo.

Per buso: Apude de la sama centra trajna stacidomo de Bilbao, nomata “Abando”, eliras buso numero 3115, kiu trairas la antaŭa ŝoseo de Portugalete al Bilbao kaj haltas ĉe la kongresejo mem (haltejo: “San Juan de Dios (Hospital)”); tiu buso iras plejparte paralele al la rivero Nervion kaj permesas rigardi diversajn lokojn, sed bezonas 45 min. por iri de Bilbao al Portugalete.

Per aŭtomobilo: Kutime, oni venas al Portugalete per granda aŭtovojo A8, kiu iras de la franca landlimo al Santiago de Compostela. En Portugalete eblas surstrate parkumi senpage. Same en proksimaj urboj. Oni devas pagi nur en Bilbao kaj Barakaldo. Tamen, ne facilas trovi liberajn lokojn por lasi la aŭtomobilon. Por parkumi ni rekomendas grandan komercan centron “Ballonti” kaj apudajn stratojn. De tie al kongresejo, ĉirkaŭ 20 min. piede.



Atentu, ke la centro de Bilbao estas “zono de malalta polucio”, do aŭtomobiloj, kiuj ne surportas devigan glumarkon estas monpunataj. Baldaŭ, same okazos en urbo Barakaldo, sed ankoraŭ la urbestro ne decidis ekde kiam.

120 jaroj



Simbolo de la metroo de Bilbao




Transportkarto “Barik”

<https://www.ctb.eus/es/como-funciona-barik>

<https://www.ctb.eus/en/how-barik-works>

<https://www.ctb.eus/eu/ohiko-galderak-0>



ESPERANTA GRUPO DE BILBAO

(1906-2026)



LISTO DE KONGRESANOJ

1. Jesús Miguel García Iturriz (Portugalete, Eŭskio)
2. Guadalupe Casilla Mimbrero (Portugalete, Eŭskio)
3. Susana Zabaco Perex (Castro-Urdiales, Kantabrio)
4. Ricardo Biurrun González (Madrid, Madrida Komunumo)
5. David Redondo Rodríguez (Bilbao, Eŭskio)
6. Hodei Redondo Cortés (Bilbao, Eŭskio)
7. Itziar Arteché Urrutia (Bilbao, Eŭskio)
8. Ana Manero (Madrid, Madrida Komunumo)
9. Manolo Parra Benito (Madrid, Madrida Komunumo)
10. Enrique Navarro Rubio (Zaragoza, Aragono)
11. Bogusław Ubik-Perski (Weil am Rhein, Germanio)
12. Liven Dek (Muriedas, Kantabrio)
13. Pedro Ullate Lopez (Muriedas, Kantabrio)
14. Sabin Orueta Mendia (Leioa, Eŭskio)
15. Enriqueta Sesmero Cutanda (Bilbao, Eŭskio)
16. Emma Breuninger (Elchingen, Germanio)
17. Alberto Granados Orcero (Teruelo, Aragono)
18. Francisco Javier Herrero Armijo (Teruelo, Aragono)
19. Javier Martín Gómez (Teruelo, Aragono)
20. Jordi Lietor (Almería, Andaluzio)
21. Pedro M. Martín Burutxaga (Blanes, Katalunio)
22. Santiago Martín Relea (Sodupe, Eŭskio)
23. Antoni Badia i Planes (Lleida, Katalunio)
24. Francisco López López (Bilbao, Eŭskio)
25. Xabier Detournay (Magrie, Francio)
26. Carlos Llama Salazar (Barakaldo, Eŭskio)
27. Rafael Blanco Arbe (Kaseda, Navaro)
28. Yolanda Díez Saiz de la Maza (Barakaldo, Eŭskio)
29. Octavio Gutiérrez Moja (Galdakao, Eŭskio)
30. Javier Romero Tello (Herrera del Duque, Ekstremaduro)
31. Xabier Rico Iturriotz (Vitorio-Gasteiz, Eŭskio)
32. Lupe Sanz Bueno (Madrid, Madrida Komunumo)



33. Carmen Suárez Fernández-Cid (Madrid, Madrida Komunumo)
34. Félix Jiménez Lobo (Madrid, Madrida Komunumo)
35. Pablo Jorge Pinazo (Teruel, Aragono)
36. Sylvie Medina (Angers, Francio)
37. Geneviève Gourichon (Brissac Loire Aubance, Francio)
38. Igone Manciles (Bilbao, Eŭskio)
39. Mila Mezo (Bilbao, Eŭskio)
40. Aleksander Zdechlik (Zabrze, Pollando)
41. Jarosław Gerszyński (Gliwice, Pollando)
42. María Avelinda Ruiz Cervel (Zaragoza, Aragono)
43. María Pilar Serrate Domínguez (Zaragoza, Aragono)
44. Ne deziras aperi en la listo
45. Toño del Barrio Unquera (Alkorkono, Madrida Komunumo)
46. Ne deziras aperi en la listo
47. Ne deziras aperi en la listo
48. Francisco Balibrea Iniesta (Leono, Kastilio kaj Leono)
49. Jose María Salguero Rodríguez (Don Benito, Ekstremaduro)
50. Juan Luis Salguero Rodríguez (Don Benito, Ekstremaduro)
51. Carmen Cidoncha Velarde (Don Benito, Ekstremaduro)
52. Ne deziras aperi en la listo
53. Ne deziras aperi en la listo
54. Luis Eduardo Berdor Ramón (Zaragoza, Aragono)
55. Pedro Garrote Escribano (Valadolido, Kastilio kaj Leono)
56. Ángel Maricalva Gallardo (Valadolido, Kastilio kaj Leono)
57. María Dolores Parra Benito (Gijón, Asturio)
58. María Purificación Parra Benito (Segovio, Kastilio kaj Leono)
59. Carlos Espínola (Malago, Andaluzio)
60. Marion Quenut (Tuluzo, Francio)
61. Patxi de la Hoz Méndez (Santurtzi, Eŭskio)
62. Pablo Vicente Valero (Segovio, Kastilio kaj Leono)
63. Suzanne Bolduc (Montrealo, Kanado)
64. Dalia Pileckienė (Kaunas, Litovio)
65. Ne deziras aperi en la listo
66. Dominik R. Schramm (Donostio, Eŭskio)
67. Ángel Arquillos López (Malago, Andaluzio)


68. Marilo Torres Mateo (Malago, Andaluzio)
69. José Luis Vara Muñoz (Alcalá de Henares, Madrida Komunumo)
70. Rafaela Urueña Álvarez (Valadolido, Kastilio kaj Leono)
71. Gloria Sánchez Bardera (Madrido, Madrida Komunumo)
72. Antonio Romero Beltrán (Sevilo, Andaluzio)
73. Jesús Esteban Delgado (Sabadell, Katalunio)
74. Mar Pallarès Barberà (Sabadell, Katalunio)
75. Alberto Lobato Reguera (Bilbao, Eŭskio)
76. Franciska Toubale (Mount Evelyn, Australio)
77. Christiane Boutier (Le Mans, Francio)
78. Teodoro Ibáñez Martín (Bilbao, Eŭskio)
79. Luis Salag Laguarda (Milata, Valencio)
80. Aleksei Salomatov (Moskvo, Rusio)
81. Marina Soloveva (Moskvo, Rusio)
82. Pierre Gauthier (Parizo, Francio)
83. Joel Fontaine (Strasburgo, Francio)
84. Laure Wolff (Strasburgo, Francio)
85. Concepción Pereira Lamelas (Vigo, Galegio)
86. Joan Clos Rigual (Vilafranca del Penedès, Katalunio)
87. Ne deziras aperi en la listo
88. Elsa Martínez Castro (Madrido, Madrida Komunumo)
89. Pedro Martínez Talaván (Madrido, Madrida Komunumo)
90. Paula Martínez Martínez (Madrido, Madrida Komunumo)
91. David Trigo Pérez (Tabanera de Monte, Kastilio kaj Leono)
92. Bruno Henry (Fameck, Francio)
93. Manjuan Zhang (Fameck, Francio)
94. Ángel González Lorenzo (Las Palmas de G. C., Kanariaj Insuloj)
95. Ricardo J de León Durango (Las Palmas de G. C., Kanariaj Insuloj)
96. M. Eugenia Sánchez Falcón (Las Palmas de G. C., Kanariaj Insuloj)
97. Echedey Jorge Santana (Las Palmas de G. C., Kanariaj Insuloj)
98. Begoña Larrouy Norabuena (Bilbao, Eŭskio)
99. Félix Sánchez Boquete (Santiago de Compostela, Galegio)
100. Joxemari Sarasua Fernández (Etxalar, Navaro)
101. Edorta Moreno Martín (Santurtzi, Eŭskio)
102. Pedro A. Hernández Úbeda (Madrido, Madrida Komunumo)

103. Raimo Tuisku (Tampere, Finnlando)
104. Ĵenja Martínez Pérez (Bremeno, Germanio)
105. Antonio Valén Fernández (Vigo, Galegio)
106. Teresa Ayerra Burguete (Barañain, Navaro)
107. Miren Elizagarai (Barañain, Navaro)
108. Nieves Ayerbe (Pamplono, Navaro)
109. Lis de Mosteyrín Hernández (Segovio, Kastilio kaj Leono)
110. Juan del Castillo (Madrido, Madrida Komunumo)
111. Francisco Inglada Ferrer (Tarragona, Katalunio)
112. Sol Roca Carroggio (Tarragona, Katalunio)
113. Yann Aubain (Villeurbanne, Francio)
114. José Pina Tuells (Cabezo de Torres, Murcio)
115. Larisa Osadchuk (Montpellier, Francio)
116. Laura Esteban Gómez (Segovio, Kastilio kaj Leono)
117. Orlando Raola (Arganda del Rey, Madrida Komunumo)
118. Elsa Torres (Arganda del Rey, Madrida Komunumo)
119. Ana Montesinos de Gomis (Bétera, Valencio)
120. Xon Vilahur Godoy (Cassà de la Selva, Katalunio)
121. Miguel Ángel Bueno Ávila (Puente Villarente, Kastilio kaj Leono)
122. Olga Skobyeyeva/Bauer (Chernivco, Ukrainio)
123. Virginie Harlet (Die, Francio)

ESPERANTA GRUPO DE BILBAO


(1906-2026)

★ ★ ★
120 **NOTOJ** **jaroj**



ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)

120 jaroj



ESPERANTA GRUPO DE BILBAO
(1906-2026)

La Espero

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
perflugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion:
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj;
sed dissaltos la obstinaj baroj,
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.